



Pos-Amiko

IJK 2022, forirtago, numero 49
Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Partoprenantoj petas veturigon

“Ĉu iu povas matene je la 6:00 veturigi min al la bushaltejo? Estas longa voja de la tendo al la parkejo antaŭe, kaj mi timas ke mi perdiĝos.”

– averaĝa postulema kongresano

TEJO konsideras denove organizi IJK-n

La tuta afero ŝajnis freneza ideo kiam ĝi estis nur ideo, sed nun post sep tagoj da varma, freneza kunestado eĉ la ardaĵ kritikintoj devas konfesi, ke Internacia Junulara Kongreso povas funkcii. La nederlanda teamo pruvis la potencialan de la koncepto en ĝojplena, neforgesebla semajno en Westelbeers (kaj ne pro Westelbeers).

La estraro de TEJO ne volas tuj promesi sekvan okazigon de tiel nomata ‘IJK’, sed ĝi almenaŭ starigas komisionon por diskuti ideojn kaj ellabori pli detalajn planojn. Unu grava diskutpunkto estas tio, ĉu estontaj IJK-j ĉiam okazu en la nuna, pruvite taŭga kongresloko, aŭ ĉu la kongreso vojaĝu de loko al loko en diversaj landoj. Jam iuj personoj proponis, ke ebla estonta kongresloko estus en norda Italujo, sed tiu ideo ankoraŭ ne evoluis ĝis pli ol skiza propono.

Alia demando estas, ĉu Internaciaj Junularaj Kongresoj estu organizataj ĉiam de la samaj homoj, ĉu ĉiujare de tute nova teamo, aŭ iu meza vojo inter la du eblecoj. Tamen tiu ĉi demando efektive jam estas respondita, kiam membro de la ĉi-jara organiza teamo jene reagis al propono pri rea okazigo de IJK:

“Ne. Ne, ne, ne! Unufoje sufiĉas. Fekdamnaj esperantistoj...”

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Via vivo estas nun kompleta, vi ĉeestis IJK-n 2022.

Taŭro: Ni rekomendas frosti vin mem kaj malfrosti tuj antaŭ sekva IJK.

Ĝemeloj: Estas jam tempo por krei familion kaj kreskigi la sekvan IJK-generacion.

Kankro: Se vi jam nun volas aliĝi al la sekva IJK, kreu vian propran aliĝilon kaj plenu ĝin.

Leono: La rekomendita kuracilo kontraŭ postkongresa sindromo estas regulaj memoj.

Virgulino: Post IJK 2022 vi ne plu estos.

Pesilo: Vi ne plu estas en la kongresejo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Printu ĉiujn fotojn de la kongresa fotaro kaj pendigu ilin sur ĉiujn viajn murojn.

Roĉjo: Vi finfine ripozu kaj rigardu la sunon leviĝi super dankema universo.

Sagitario: Ju pli malrapida la transportilo, des pli longe ankoraŭ daŭros la revenkaravano!

Kaprikorno: Komencu serĉi kongreslokon por estonteca 365-taga IJK.

Akvisto: Telefonu ĉiutage al ĉiu kongresano por eviti postkongresan sindromon.

Fiŝoj: Vi malkovris, ke pli agrablas kongreso ol progreso.

Programo

	<u>Manĝejo</u>	<u>Ekstere</u>	<u>Scenejo</u>	<u>Filmejo</u>	<u>For</u>
08:00	Matenmanĝo				6:00 & 7:30 buso
09:00					9:40 IJK-buso
10:00					
11:00					11:25 IJK-buso
12:00					
13:00					
14:00					
15:00		Plori			
16:00					
17:00					
18:00					
19:00					
20:00					
21:00					
22:00					